

Danĝera Kaŝludo

Estis tagmezo. La suno brilis malsupren per bruliga varmego, kaj la sablo estis tiel profunda, ke la ĉevaloj laŭvorte vadis en ĝi. Tio malfaciligis la antaŭiĝo. Ĉirkaŭ la dua horo ni deĉevaliĝis denove, pro doni al la ĉevaloj la reston de la akvo, kaj pro restadi iomete. Ni mem ne trinkis. Old Death ne volis ĝin. Li opiniis, ke ni povis elteni la soifon multe pli facile ol la bestoj, kiuj peze portu nin tra tiu la sablo.

„Cetere“, li aligis ridetante, „Vi tenis Vin brave. Vi tute ne scias, kiajn distancojn ni pasis. M’pensis, ke ni estis je la Elm Creek nur je la vespero, sed ni jam atingos ĝin post du horoj. Tio estas petolaĵo, kiun vere ne ĉiu alia farus same kiel ni kun tiaj ĉevaloj.“ Tiam la maljunulo turniĝis al mi. „Pleje mi miru pri Vi, *Sir*. Mi rigardis Vin dum la lastaj tagoj, kaj miriĝis, kiel bone Vi travivis la streĉigojn de la rajdado.“

„Ho, mi jam estis en mia hejmlando bona rajdanto!“

„Eble. Sed tio ne estas ĉio. *Mr.* Lange, sia filo kaj la negro ankaŭ estas bonaj rajdantoj, sed ne en la sama senco kiel Vi. Tiel, kiel Vi sidas nur okzidentulo sur la ĉevalo, aŭ iu, kiu estis estinta en la okzidentulo longan tempon.“

Hups! Mi do kvankam ĉio, sen esti sciinta ĝin, estis falinta el mia elektita rolo, kaj ĝi gravis esti estonte pli gardiĝe.

„Ha, Vi parolas pri la teniĝo!“ mi tial diris. „Tiun mi imitis de Vi. Vi ja estas mia instruisto, kaj mi klopodas fari ĉion same kiel Vi.“

Old Death kunpinĉis unu okulon, kaj diris plibonsciante: „Vi ne povas mistifiki min! Tion oni ne lernas dum malmultaj tagoj, sed estas rezulto de longa trejnado. Neparolante pri tio, ke mi tutcerte estus rimarkinta, se Vi vere estus eklerninta ion.“

„Nu, kiam Vi urgĝas min tiel, mi konfesas, ke mi jam estis unu fojon antaŭe en la

okzidento, sed je ne en tiu ĉi regiono.“

„Kial Vi forsilentis tion de mi?“

„Ĉu forsilentis?“ mi agis mirigite. „Vi ne demandis min, kaj tial mi ne diris ĝin al Vi.“

„*Well!* Mi ja ne kontraŭas! Mi ne volas intermiksiĝi en Viajn aferojn. Vi memkompreneble estas Via propra estro!“

Ni kontinuus la interrompitan rajdadon, dum kiu la maljunulo deĝis iomete de la okzidenta direkto suden. Demandite pri la kaŭzo, li respondis:

„En tiu direkto estas longatempa konatulo, kiun mi ŝate volas revidi, kaj mi volas uzi la ŝancon informigi lin. Ĉiel estas vera miraklo, ke ni ne jam ektrovis la spuron de la komanĉoj. Tutcerte ili cedis pi fore al la rivero. Kia stultaĵo, ke ili serĉadas la fuĝintan apaĉon tiel longe! Se ili estus irinta ĵus trans la Rio Grande, ili estus surprizigintaj la malamikojn.“

„Certe ili konsideris, ke ili povas fari tion sameble ankoraŭ nun“, Lange diris, „ĉar se Winnetou kun la lezito ne feliĉe transvenos, la apaĉoj tute ne scios, ke la perfidaj komanĉoj estas tiel proksime.“

„Hm! Tio fakte ne estas tiel nevere, *Sir*. Ĵus la fakto, ke ni ne vidas la komanĉojn, afliktigas min pri Winnetou. Ili ne plu ĉirkaŭmigras, sed ili ŝajnas kuniĝintaj. Tio estas tre malbona signo por la apaĉoj. Eble ili estis ekkaptataj.“

„Kiu estus la sorto de Winnetou tiukaze?“

"Le plej teruriga, kiu elpenseblas. Esti kaptinta la faman ĉefon de la apaĉoj estus al la komanĉoj neniam antaŭe estinte okazo, kiu estus solenenda en digna, tio estas, teruriga maniero. Sub la plej certa gardo li estus transportata al ilia hejmo, al la tendetoj de la komanĉoj, kie nur la virinoj, la knaboj kaj la malsanoj estas reresintaj. Tie li estus bone flegata kaj nutrata, pro ke li povos elteni poste la penojn sur la torturofosto laŭeble longe. Winnetou devus ekmorti, sed ne rapide, ne dum unu horo, ne dum unu tago. Oni disigus lian korpon per preskaŭ scienca gardiĝo iom post iom, tielke povas pasiĝi pluraj tagoj, antaŭ la morto estus savonta lin. Tio estas la deca mortigo de ĉefo, kaj mi estas konvinkita, ke Winnetou dum ĉiuj la elektitaj penigoj neniam ekmienos, sed des pli mokadus kaj ridadus pri siaj mortigantoj. Mi vere afliktiĝas pri li, kaj mi diras sincere al Vi, ke mi tiukaze estus riskanta mian vivon pro savi lin. Laŭ ĉia verŝajneco la komanĉoj estas tie okcidente antaŭ ni. Ni rajdas iomete suden, pro veni al delonga amiko de mi. De li ni eble ekscios, kiel la situacio je la Rio Grande estas. Ni tiam restos ĉe li dum la nokto.“

„Amiko de Vi loĝas en tiu ĉi regiono, ĉu?“ mi demandis.

„Jes. Li estas *ranchero*, do agrikulturisto, vera meksikano de pura hispana deveno. Unu el liaj prauloj estis iam honorige kavalirigita de iu, tial li nomas ankaŭ sin mem *caballero*, do kavaliro. Tial li ankaŭ donis al sia *ranchito* la belsonan nomon Estancia del Caballero. Lin mem Vi nomu Don Atanasio.“

Post tiuj klarigoj ni silente plurajdis. Ni ne sukcesis regalopigi niajn ĉevalojn, ili sinkis ĝis sub la pasterno en la sablon. Sed iom post iom ĝia profundeco plimalaltiĝis, kaj ĉirkaŭ la kvara horo posttagmeze ni salutis la unuan herbeton. Tiam ni rajdis trans prerio, sur kiuj rajdantaj *vaqueroj* gardis iliajn ĉevalojn, bovojn kaj ŝafojn. Niaj ĉevaloj

revigliĝis; ili mem plirapidiĝis. Arboj ekaperis, kaj finfine ni vidis ion blankan brileti el la verdaĵo antaŭ ni.

„Tio estas la Estancia del Caballero“, Old Death klarigis. „Stranga domo, ekzakte konstruita en la stilo de la konstruaĵoj de la Mokvioj kaj la Zunjoj, vera fortikaĵo, kio ja ankaŭ ege necesas en tiu ĉi regiono.

Ni pliproksimiĝis al la konstruaĵo kaj baldaŭ povis rimarki la detalojn. Duoble hom-alta muro estis konstruita ĉirkaŭ ĝi. Ĝi havis altan kaj vastan pordegon, antaŭ kiu vasta ponto kondukis trans profunda, sed nun malplena akvofoso. La domo havis kuban formon. La teretaĝon ni ne povis vidi, ĉar ĝi estis kovrata tute per la muro. La dua etaĝo estis iomete pli malvaste, tielke estis ĉirkaŭa spaco por rondirejo, kiu havis blankajn tendotukojn kiel tegmento. Sur tiu kubforma dua etaĝo estis tria kun sama formo. Ties bazareo refoje estis iomete pli malvasta, tiel ke denove estis formigata rondirejo, kiu estis tegmentita per linajoj. Tiel la teretaĝo, la dua kaj tria etaĝo konsistis el tri murkuboj, el kiuj la pli alta ĉiam estis iom pli malgranda ol la suba. La muroj estis blankigitaj, la linajoj havis la saman koloron, kaj tiel la konstruaĵo brilis for en la ĉirkaŭon. Nur kiam ni estis proksimiĝintaj plu, ni rimarkis je ĉiu etaĝo rondirantajn vicojn de malvastaj, krenelecaj murtruojn, kiuj ŝajne estis fenestroj.

„Bela palaco, ĉu ne?“ Old Death ridetis. „Vi miros pri la ekipo. Mi volas vidi la indianĉefon, kiu imagas, ke li povis ŝtormi tiun domon!“

Nun ni rajdis trans la ponto al la pordego, en kiu estis malgranda malfermaĵo. Je la flanko pendis sonorilo, granda kiel homkapo. Old Death sonigis ĝin. Oni povis aŭdi la sonon boneble pli ol horan rajdadon ĉirkaŭe. Baldaŭ poste indiana nazo kaj du abundaj lipoj aperis je la truo. Tra la du lipoj ĝi sonis en la hispana lingvo:

„Kiu estas tie?“

„Amikoj de la domestro“, la *scout* respondis. „Ĉu Don Atanasio estas hejme?“

La nazo kaj la buŝo malleviĝis, du malhelaj okuloj elvidis, kaj tiam ni aŭdis la vortojn:

„Kia plezuro, *Señor* Death! Vin mi tuj enlasas. Venu, *señor*oj! Mi anoncos Vin.“

Oni aŭdis riglilon moviĝi, tiam la pordego malfermiĝis, kaj ni enrajdis. La viro, kiu enlasis nin, estis dika, per blankaj linajoj vestita indiano, unu el la *indios fideles*, tio signifas baptitaj indianoj, kiuj kontraŭe al la ‚sovaĝaj‘ *indios bravos* paceme kutimiĝis al la civilizacio. Li fermis la pordegon, faris profundan kliniĝon, tiam paŝis honorplene trans la korto kaj tie tiris draton, kiu pendis de la muro.

„Ni havas tempon rajdi ĉirkaŭ la domo“, Old Death diris. „Kunvenu rigardi la konstruaĵon!“

Nur nun ni povis vidi la teretaĝon. Ankaŭ en ties muroj estis aro de malgrandaj elpafejoj. La konstruaĵo staris sur murĉirkaŭita korto, kiu estis sufiĉe larĝe kaj ne pavimite, sed surkreskita per herboj. Krom la elpafejoj neniu fenestro estis videbla, kaj ankaŭ ne tiel pordo. Ni rajdis ĉirkaŭ la tuta domo, kaj revenis al la antaŭa flanko, sen esti trovinta enirejon. La indiano ankoraŭ atende staris tie.

„Sed kiel oni povas iri en la internon de la konstruaĵo?“ Lange demandis.

„Vi ĵus ekscios ĝin!“ Old Death respondis.

De la rondirejo de la dua etaĝo kliniĝis viro, pro vidi, kiu staris malsupre. Kiam li rimarkis la indianon, lia kapo remalaperis, kaj tiam mallarĝa, grimpileca ŝtuparo estis malsuprenigita, laŭ kiu ni iru supren. Se oni nun estis havinta la opinion, ke tie estis en la teretaĝo almenaŭ unu pordo, oni eraris. Ni supreniris eĉ plu. Supre sur la dua etaĝo kaj sur la tegmento staris ankaŭ servistoj, ankaŭ blanke vestitaj, kiu malsuprenlasis duan kaj trian ŝtuparon, laŭ kiuj ni finfine atingis la ebenan platformon de la domo. Ĝi estis kovrita per zinklado, kaj dika nivelo el sablo. En la mezo troviĝis kvarangula truo, kiu estis la enirejo al ŝtuparo, kiu kondukis en la internon.

„Tiel oni konstruis pueblojn jam antaŭ jarcentoj“, Old Death klarigis. „Neniu povas facile veni sur la korton. Kaj se iu malamiko kvankam sukcesus grimpi trans la muro, tiam la ŝtuparoj estas suprenigataj, kaj li staras antaŭ la senporda konstruaĵo. En pacaj tempoj kompreneble oni ankaŭ povas en- kaj suprenveni sen pordego kaj ŝtuparoj, perke oni stariĝas sur ĉevalon kaj grimpas trans la muro kaj sur la unuan rondirejon. Sed en la kazo de milito mi ne volas konsili al iu provi tion, ĉar de tiu platformo kaj de la rondirejoj oni povas facile ekipi la muron, la antaŭan lokon kaj ankaŭ la korton per kugloj, kiel Vi vidas. Don Atanasio certe havas ĉirkaŭ dudek *vaquero*:jn kaj *peón*:ojn, el kiu ĉiu posedas pafilon. Se dudek el tiuj viroj starus ĉi supre, cent da indianoj devus ekmorti, antaŭ la unua el ili sukcesus grimpi trans la muro. Tiu ĉi konstrumaniĝo estas granda avantaĝo ĉi tie apud la limo, kaj la *estanciero* estas elteninta jam pli ol unu sieĝon, kaj sukcesis defendiĝi.

De la alteco de la domo oni povis vidi fore en ĉiun direkton. Mi rimarkis, ke malantaŭ la domo, nur mallonge distance, pasfluis la Elm Creek. Ĝi havis belan, klaran akvon, kaj ne estis miraklo, ke ĝi ebligis fekundecon sur ambaŭ flankoj. La alvido al ĝi vekis en mi la deziron bani en ĝi.

Ni paŝis, gvidate de servisto, malsupren laŭ la ŝtuparo, kaj tiel atingis longan, mallarĝan koridoron sur la unua etaĝo, kiu estis lumigata per du elpafitejoj antaŭ kaj malantaŭ. Sur ambaŭ flankoj estis pordoj, kaj je la malantaŭa fino ŝtuparo kondukis al la teretaĝo. Pro veni de la korto tien ĉi, oni do devis eksterne grimpi laŭ tri ŝtuparoj supren, kaj interne laŭ du ŝtuparoj malsupren. Tio ŝajnis tre malutile, sed havis bonan kaŭzon per la cirkonstancoj de la regiono. La servisto malaperis malantaŭ pordo, kaj revenis nur post kelka tempo, pro anonci, ke la *señor capitán de caballería* atendis nin. Dum tiu atenda tempo Old Death donis kelkajn klarigojn al ni.

„Ne pensu malbone pri mia delonga amiko, kiam li akceptas Vin iomete ceremonie! La hispano amas la formalecon, kaj la meksikano, kiu devenas de li, tenas tion. Se mi estus veninta sole, li estus salutinta min jam multe pli frue. Sed ĉar aliaj kunestas, tio nun estos kvazaŭ interŝtata bonvenigado. Ne risku rideti, se li aperos en uniformo! En lia juna aĝo li havis la rangon de meksikula kavaleria kapitano, kaj montriĝas ankoraŭ hodiaŭ en lia eksmodiĝinta uniformo. Cetere li estas bonega viro.“

Tiam la servisto venis, kaj ni iris en bonfartige malvarmetan ĉambreton, kies iam certe valoraj ekipaĵoj nun estis ege paliĝintaj. Tri duonvualitaj elpafejoj enlasis heletan lumon. En la mezo de la ĉambro staris alta, maldika sinjoro kun neĝblankaj kap- kaj lipharoj. Li surhavis ruĝan, per larĝaj orborderaĵoj ornamita pantalonon, altajn rajd-

botojn el brilanta glatledo kun spronoj, kies radoj havis la grandecon de grandaj moneroj. La uniforma ĉemizo estis blua kaj abunde ornamita per oraj brustostrioj. La oraj epoletoj indikis la rangon de ne nur kapitano, sed eĉ de generalo. De lia flanko pendis sabro en ŝtala ingo, kies teniloj ankaŭ estis origitaj. En la maldekstra mano li tenis triangulan ĉapelon, kies randoj abundis je oraj borderaĵoj. En ĝi estis fiksigita brilanta agrafeto, kiu portis multkoloran plumaron. Tio aspektis kiel karnavalo. Sed kiam oni vidis en la maljunan, seriozan vizaĝon, kaj en la ankoraŭ ardan, bonvolajn okulojn oni ne plu povis havi la malrespekton kaŝe ridi. Kiam ni eniris, la domestro kunbatis la kalkanumojn sprontinte, kaj rektiĝis rigide.

„Bonan tagon, miaj sinjoroj! Vi estas tre bonvenaj!“

Tio sonis formalega. Ni silente kliniĝis. Old Death respondis al li en la angla lingvo.

„Ni dankas, *señor capitán de caballería*! Ĉar ni estis troviĝantaj en ĉi regiono, mi volis doni la ŝancon al miaj akompanoj saluti Vin, la bravan aganton pro la nedependeco de Meksikujo. Permesu al mi prezenti ilin al Vi!“

Dum tiuj flataĵaj vortoj aperis kontenta rideto sur la vizaĝo de la estanciero. Li kapskuetis akceptante kaj respondis ankaŭ en la angla:

„Faru tion, *Señor Death*! Estas granda plezuro al mi konatiĝi kun la *gentleman*:oj, kiujn Vi kondukis al mi.“

Old Death diris niajn nomojn. La *caballero* donis sian manon al ni ĉiuj, eĉ al la negro, kaj invitis nin sidiĝi. La *scout* demandis pri *señora* kaj *señorita*, je kio la *estanciero* tuj malfermis pardonon, kaj envenigis la jam prete starintajn sinjorinojn. La *señora* estis bela, amikece vidanta maljuna damo, la *señorita* ĉarma knabino, ŝia nepino, kiel ni eksciis poste. Ambaŭ estis vestitaj tute en nigra silko, kvazaŭ ili estus ĵus irontaj pro aperi je kortego. Old Death rapide iris al ili kaj skuis iliajn manojn tiel elkore, ke mi ete ektimis. La Lange:oj provis sukcesi kliniĝon, Hektor rikanis per la tuta vizaĝo kaj vokis:

„O *missis, missis*, kvale bela, kvale silko!“

Mi paŝis al la *señora*, levis ŝian manon kaj tiris ĝin al miaj lipoj. La sinjorino akceptis mian ĝentilecon tiel bonvole, ke ŝi ofertis al mi sian vangon, pro ricevi la *beso de cortesía*:n, la honoran kison, kio estis granda distingigo por mi. La samo ripetiĝis je la *señorita*. Nun ĉiuj residiĝis. Tuj estis ekparolata pri la celo de nia rajdado. Ni rakontis, kion ni pensis esti necese, ankaŭ nian renkonton kun la komanĉoj. La gesinjoroj aŭskultis nin per la plej granda atento, kaj mi rimarkis, ke ili signifoplene vidis unu al la alia ree kaj ree. Kiam ni estis finiĝintaj, Don Atanasio petis pri priskribo de la du viroj, kiujn ni serĉis. Mi elpoŝigis la bildojn, kaj montris ilin. Apenaŭ, ke ili ekvidis al ili, la *señora* vokis:

„Estas ili, estas ili! Tute certe! Ĉu ne, kara Atanasio?“

„Jes“, la *caballero* konsentis, „estas vere ili. *Señor*:oj, tuj viroj estis ĉe mi dum la pasinta nokto.“

„Kiam ili venis, kaj kiam ili foriris?“ la *scout* demandis.

„Ili venis malfrue en la nokto, kaj tre ege lacis. Unu el miaj *vaquero*:j estis renkontinta ilin, kaj kondukis ilin en la domon. Ili dormis tre longe kaj vekis nur post la tagmezo. Pasis maksimume nur tri horoj, ekde ili foriris.“

„Bone! Do ni certe atingos ilin morgaŭ. Ni ĉiel trovos iliajn spurojn.“

„Certe, *señor*, Vi trovos. De tie ĉi ili volis iri al la Rio Grande, pro transi ĝin supre de la Eagle-transpasejo, cirkaŭ inter la Rio Moral kaj la Las Moras Creek. Cetere ni ankoraŭ estos aŭdantaj pri ili poste. Mi sendis kelkajn *vaquero*:jn malantaŭ ili, kiuj diros al Vi, kien ili rajdis.“

„Kial Vi sendis virojn antaŭ ili?“

„Ĉar tiuj du homoj ne rekompencis mian gastamon per danko. Kiam ili forrajdis, ili sendis la *vaquero*:n de ĉevalaro al mi kun elpensita mesaĝo, kaj ŝtelis dum lia neĉeesto ses ĉevalojn de mi, kun kiuj ili haste foriĝis.“

„Aĉe! Do la du viroj ne estis sole, ĉu?“

„Jes. Estis aro da civilvestitaj soldatoj ĉe ili, kiuj devis gvidi nove dungitajn rekrutojn al Meksikujo.“

„Do mi pensas ne, ke Viaj anoj realportos la ĉevalojn. Ili estas tro malfortaj kontraŭ la ŝtelintoj.“

„Ho, miaj *vaquero*:j scias, kiel ili uzu la armilojn, mi ja elektis la plej taŭgajn virojn!“

„Ĉu Gibson kaj Ohlert parolis pri iliaj cirkonstancoj kaj planoj?“

„Neniun vorton. Unu estis tre gaja, kaj la alia tre silentema. Mi havis la plej grandan fidon pri ili. Ĉar ili petis al mi montri al ili la internon de mia domo, ili eĉ vidis la vunditan indianon, kiun mi alikaze kaŝas antaŭ ĉiuj.“

„Vundita indiano estas tie ĉi, ĉu? Kiu estas tiu viro, kaj kiel li venis tien ĉi?“

La *caballero* videbligis superan rideton.

„Jes, *señor*:oj, nun Vi miriĝos. Mia gasto estas la intertraktanto de la apaĉoj, pri kiu Vi estis rakontantaj, la vundito, kiun Winnetou bandaĝis supre apud la Rio Leona. Estas la maljuna ĉefo Inda-niŝo.“

„Ĉu Inda-niŝo, la ‚Bona Viro‘? La saĝa kaj pacamanta ĉefo de la apaĉoj? Tiu mi vidu!“

„Mi montros lin al Vi. Li venis al mi en malbona stato. Vi sciu, ke Winnetou konas min, kaj ĉiam restas ĉe mi, kiam li venis en tiun ĉi regionon, ĉar li scias, ke li povas fidi pri mi. De Fort Inge li estis atinginta la alian ĉefon. Indo-niŝo ricevis kuglon en la brakon, kaj alian en la femuron. Winnetou bandaĝis lin apud la Rio Leona; tiam ili tuj plurajdis. Sed la maljuna, vundita viro estis subigata ege de la vundfebro, kaj la komandĉoj elvarmis ĉie en la dezerton pro kapti lin. Kiel Winnetou sukcesis alporti lin kvankam ĉiuj tiuj obstakloj ĝis tien ĉi al mia *estancia*, tio estas enigmo al mi ankoraŭ nun. Tion do nur Winnetou povas sukcesi. Sed de tie ĉi ili ne povas pluiri, ĉar Inda-niŝo ne plu kapablis teniĝi en la selo, tiel malforte li estis, kaj tiel forte la febro tremigis lin. Li estis perdinta multan sangon, kaj tio ne estas negravaĵo je lia aĝo de pli ol sepdek jaroj.“

„Oni apenaŭ povas kredi, ke tio eblas! Resti en la selo de Fort Inge ĝis tien ĉi kun tiaj vundoj! La vojo, laŭ kiu ili rajdis, estas preskaŭ sesdek anglaj mejloj. En tiu aĝo nur ruĝulo povas elteni tion. Bonvolu, pluparolu!“

„Ili alvenis tie ĉi je la vespero kaj sonoris. Mi mem iris malsupren kaj ekkonis Winnetou:n. Li rakontis ĉion al mi kaj petis al mi akcepti sian ruĝan fraton kiel gaston,

ĝis li estos deportata. Li mem devis rapide iri trans la Rio Grande, pro raportoj al siaj triboj pri la perfido kaj la alveno de la komanĉoj. Mi kundonis al li miajn plej bonajn *vaquero*-jn pro scii poste, ĉu li sukcesis trairi. Ili devis akompani lin, kaj tiam sciigu min.“

„Nu ĉu?“ Old Death demandis streĉite. „Ĉu li trairis?“

„Jes. Kaj tio trankviligis min. Winnetou estis tre ruze, kaj iris trans la Rio Grande ne supre je la Rio Moral, kie la komanĉoj atendas, sed pli malsupre. Tie ja ne estas trair-ejo. La rivero fluas tie tre forte, kaj estas vivdanĝera risko tranaĝi tie. Tamen miaj *vaquero*-j trairis kun li, kaj akompanis lin plu, ĝis ili povis esti certe, ke li ne plu renkontos la komanĉojn. Nun la ĉefo estas sciiginta siajn apaĉojn, kaj ili dece akceptos la malamikojn. — Sed nun kunvenu al la maljuna ĉefo, se ĝi plaĉas al Vi, *señor*-oj!“

Ni stariĝis, adiaŭiĝis de la sinjorinoj, kaj malsuprenpaŝis al la teretaĝo. Sube ni troviĝis en simila koridoro kiel supre. Ni iris tra la plej malantaŭa pordo maldekstra.

Tie estis, en malvarmeta ĉambro, la altaĝa apaĉo. Mi jam timis, ke mia kaŝludado antaŭ Old Death nun ekfiniĝus. Ke Inda-niŝo rekonis min, kaj salutis min kiel Old Shatterhand. Sed ĝi okazis alie. La febro ja estis malaltiĝinta, sed la maljunulo ankoraŭ estis tre malforte kaj nur duone konscie, tiel ke li povis apenaŭ paroli. Liaj okuloj estis reenigiĝintaj profunden en la ingojn, kaj la vangoj estis maldikiĝintaj. Kuracisto tie ne estis. Sed la *caballero* diris, ke Winnetou estis majstro de la traktado de vundoj. Li estis surmetinta sanigajn herbojn, kaj strikte malpermesinta deigi la bandaĝojn. Ĵus kiam la vundfebro estos pasiĝinta, oni ne plu afliktiĝu pri la vivo de la malsanulo, ĉar nur la ega sangoperdo kaj la febro estis malfortiginta lin.

Ekstere en la koridoro mi diris al la *estanciero*, ke mi volis bani en la rivero.

„Se Vi volas tion, Vi ne devas fari la kromvojon trans la ŝtuparoj“, li diris. „Mi ellasos Vin ĵus tie malsupre al la korto.“

„Sed mi pensas, ke ne estas pordoj tie ĉi, ĉu?“

„Sed jes, la eliro nur estas kaŝita! Mi lasis konstrui ĝin, se iam malamikaj ruĝuloj sukcesus envadi en la domon. Vidu, ĵus tie ĉi oni povas iri eksteren!“

Ĉe la muro staris ŝranketo. Li forŝovis ĝin, kaj mi vidis kaŝitan pordon, kiu kondukis al la korto. Ekstere ĝi estis kovrita per pro tiu celo plantita arbedaĵo. La domestro elkondukis min kaj montris al la muro je la alia flanko, kie estis simila arbedaĵo.

„Tie oni povas iri eksteren al la rivero! Estas la plej mallonga vojo. Sed unue atendu kelkan tempon tie ĉi! Mi volas sendi al Vi komfortan vestaĵon.“

En tiu momento la sonorilo de la pordego estis sonigata. Don Atanasio mem iris tien pro malfermi, kaj mi sekvis lin. Ekstere surĉevalis kvin rajdantoj, muskolaj, fortaj viroj, la homoj, kiujn li estis sendinta post la ĉevalŝtelintoj.

„Ĉu?“ li demandis. „Ĉu vi ne havas la ĉevalojn?“

„Ne, Don Atanasio“, unu respondis. „Ni jam estis proksime al la ŝtelintoj, kaj vidis per la spuro, ke ni devus atingi ilin post kvarona horo. Sed tiam ni ekvidis spuron de multaj ĉevaloj de la nordo, kiu kuniĝis al ilia. Do ili supozende renkontis la komanĉojn. Ni sekvis ilin plu, kaj baldaŭ ili ĉiuj estis antaŭ ni. Fakte estis komanĉoj, multe pli ol kvincent, kaj tial ni ne povis riski plu proksimiĝi al tiu superforto.“

„Tute prave. Vi ne risku viajn vivojn pro kelkaj ĉevaloj. Ĉu la komanĉoj traktis la blankulojn amikece?“

„Pro ekscii tion, ni ne povis sufiĉe proksimiĝi al ili.“

„Kien ili rajdis?“

„Al la Rio Grande.“

„Tiukaze ni ne timu antaŭ ili. Bone. Iru al viaj bestaroj!“

Per tio komento la bona *caballero* bedaŭrinde ege eraris. Estis ege multa timinda de la ruĝuloj; ĉar la komanĉoj aŭdis tuj de Gibson, kiel ni eksciis poste, ke la vundita apaĉoĉefo estis je la Estancia del Caballero. Pro tio trupo de la ruĝaj militistoj ekrajdis al la *estancia*, pro kapti Inda-niŝon, kaj puni Don Atanasio:n pro sia apaĉamikeca animstato. Tiu sed nun trankvile iris supren laŭ la ŝtuparo, kaj baldaŭ malsuprenvenis *peón*, kiu petis min sekvi lin. Li kondukis min eksteren kaj al la rivero. Supre de la *estancia* estis malprofundejo, kiun oni povis rimarki per la ondetoj sur la riverakvo. Sed sube de tiu malprofundejo la rivero estis tre profunda. Tie Angelo, la *peón*, restis starante. Li portis blanktolan vestaĵon sur la brako.

„Jen, *señor*“, li diris. „Kiam Vi estos finbaninta, surmetu tiun vestaĵon! La vestaĵojn, kiujn Vi demetos nun, mi povas rekte kunpreni. Poste sonorilu je la pordo; mi malfermos por Vi!“

Li foriĝis kun miaj vestaĵoj, kaj mi saltis en la akvon. Post la varmego de la tago kaj la streĉiĝo de la rajdado estis vera plezuro subakviĝi kaj naĝi en la profunda rivero. Bone pli ol duonan horon mi ĝuis la akvon, antaŭ ke mi surmetis la vestaĵon. Mi ĵus estis preta, kiam mia vido ekvagis al la alia bordo. Tra la arboj mi povis vidi de mia pozicio supren, kie la rivero havis kurbon. Tie mi vidis longan aron de rajdantoj, unu post la alia, kiel la indianoj tiel ŝate kutimas rajdi. Mi kuris al la pordo kaj sonorilis. Angelo, kiu estis atentinta min, malfermis.

„Rapide al la *caballero*!“ mi diris. „Indianoj venas de trans la rivero al la *estancia*!“

„Kiom?“

„Certe pli ol kvindek.“

La viro estis ektimiĝinta videble dum miaj unuaj vortoj. Kiam mi nun diris la nombron al li, lia vizaĝo rehaviĝis trankvilan mienon.

„Ĉu ne pli?“ Angelo demandis. „Tiukaze ĝi ne tiel danĝeras. Ni trankvile povas akcepti kvindek aŭ eĉ multe pli da ruĝuloj, *señor*. Ni ĉiam estas pretaj por tia vizito. Mi ne povas iri supren al la *caballero*, ĉar mi tuj sciigu la *vaquero*:jn. Jen Vi rehavas Viajn vestaĵojn! Riglilu la pordon malantaŭ mi, kaj hastu al Don Atanasio! Sed tiru la ŝtuparojn supren malantaŭ Vi!“

„Kio pri niaj ĉevaloj? Ĉu ili estas en saveco?“

„Jes, *señor*. Ni irigis ilin eksteren al la *vaquero*:j, proke ili povas paŝtiĝi. Sed la ledajoj estis portitaj en la domon. La bestoj ne povas esti forprenataj de ili.“

Nun Angelo forhastis. Mi rigle malfermis la pordon malantaŭ li kaj grimpis supren laŭ la ŝtuparoj, kiujn mi rapide suprentiris malantaŭ mi. Ĵus kiam mi atingis la platformon, Don Atanasio ekaperis kun Old Death el la interno de la domo. La *estanciero* tute ne ektimiĝis, kiam mi anoncis al li la alvenon de kvindek indianoj.

„Al kiu tribo ili apartenas?“ li demandis trankvile.

„Tion mi ne scias. Mi ne povis ekkoni la ŝminkaĵon de la vizaĝoj.“

„Nu, ni baldaŭ ekscios tion. Aŭ estas apaĉoj, kiujn Winnetou renkontis kaj elsendis pro alporti la vunditan ĉefon, aŭ estas komanĉoj. En tiu kazo ili certe estas esplora grupo, kiu verŝajne volas demandi nin, ĉu ni vidis apaĉojn. Ili tuj plurajdos, kiam ili estso aŭdintaj nian respondon.“

„Sed tamen ŝajnas al mi, ke ili havas malamikan intencon“, Old Death diris. „Mi donas la konsilon al Vi, pretigi tuj rimedojn pro defendiĝi.“

„Tio jam estas okazinta. Ĉiu el miaj anoj scias, kion li devas fari en tia kazo. Vidu, tie ekstere Angelo kuras al la plej proksimaj ĉevaloj! Li iĝos sur unu, pro sciigos la *vaquero*:jn. Maksimume dek minutojn poste ili estos kunigintaj la bestarojn. Du el ili restas ĉe la bestoj pro gardi ilin. La aliaj frontiĝos kontraŭ la ruĝuloj. Ili laj lazoj estas danĝeraj armiloj, ĉar *vaquero* estas multe pli sperta pri tio ol indiano. Ili laj pafiloj pafas pli for ol la arkoj aŭ la malnovaj pafiloj de la ruĝuloj. Ili ne bezonas timi antaŭ kvindek ruĝuloj. Kaj ni tie ĉi sur la *estancia* estas ĉiel savitaj. Neniu ruĝulo sukcesos veni trans la muro. Cetere, mi ja povas fidi pri Vi, ĉu? Kun la nigrulo Vi estas kvin bonarmitaj viroj. Kune estas mi kun ok personoj, kiuj troviĝas en la konstruaĵo. Tio sumas al dek kvar viroj. Jen mi volas vidi la indianĉjon, kiu sukcesos krevigi la pordegon. Ho ne, *señor*! La ruĝuloj tute paceme sonorilos, faros iliajn demandojn, kaj poste reforiĝos. Kiam la esploristo vidos dek kvar bonarmitajn virojn ĉi supre, li cedos. La afero tute sendanĝeras.“

La vizaĝo de Old Death ankoraŭ esprimis dubon. Li skuis la kapon.

„M'havas penson, kiu ŝajnas pripensinda al mi. M'estas konvinkita, ke tiuj ne estas apaĉoj, sed komanĉoj. Kion ili volas tie ĉi? Nura demando certe ne kondukas ilin tien ĉi, ĉar se tie ĉi estus grupo de malamikaj apaĉoj, tie estu spuroj. Kaj pri aliaj aĵoj oni ne devus demandadi tie ĉi. Ne, la grupaĉo tutcerte havas alian kaŭzon veni ĵus al Vi, Don Atanasio, kaj tiu estas la vundita ĉefo.“

„Pri li ili ja scias nenion! Kiu estus dirinta ĝin al ili?“

„Gibson, la viro, kiun ni persekutas, kaj kiu estis estinta ĉe Vi. Vi ja montris Inda-niŝon al li. Li malkaŝis ĉi ĉion al la komanĉoj, pro ŝatigi la tribon pri si. Se tio ne ĝustas, mi ekde nun neniam plu volas esti nomata Old Death, Don Atanasio. Aŭ ĉu Vi dubas pru tio?“

„Eblas. Tiukaze la komanĉoj volos devigi nin eldoni la vunditon.“

„Ho jes. Ĉu Vi faros tion?“

„Neniukaze! Winnetou estas mia amiko. Li donis Inda-niŝon fidante sub mian gardon, kaj mi pravigu tiun fidon. La komanĉoj ne ricevos la vunditon. Ni defendiĝos!“

„Tio igos Vin en la plej altan danĝeron. Ni ja sukcesos cediĝi tiujn kvindek; sed ili revenos fortigate dekoble plinombre, kaj tiam Vi pereos.“

„Tio estos la decido de Dio. Mi plenumos mian promeson al Winnetou sub ĉiaj kondiĉoj.“

Je tio Old Death ofertis sian manon al la domestro.

„Vi estas honorulo, kaj Vi povas fidi pri nia helpo. La estro de la komanĉoj estas mia amiko. Eble mi sukcesos per tio deigi la bategon kontraŭ Vi. Ĉu Vi eble montris

eĉ ankaŭ la sekretajn pordojn en la murojn?”

„Ne, *señor*.”

„Tio bonas. Tiel longe la ruĝuloj ne konas tiujn enirojn, ni povos defendiĝi kontraŭ ili. Nun kunvenu malsupren pro alporti la armilojn!”

Dum mia foresto miaj kunuloj estis gviditaj al iliaj ĉambroj, en kiujn oni estis portinta iliajn kaj ankaŭ miajn malmultajn posedaĵojn. Tien ni iris. La ĉambro, kiu estis dediĉita al mi, estis en la antaŭa flanko de la domo, kaj estis lumigita per du el la menciitaj embrazuroj. Tie pendis mia pafilo. Kiam mi volis preni ĝin de la muro, mi vido ekmigris eksteren en la liberon, kaj mi vidis la indianojn ekaperi malantaŭ la arboj, tie, kie supre de la *estancia* estis la malprofundaĵo. Ili estis rajdintaj trans la rivero, kaj nun venis galope al la konstruaĵo, ne hurlante, kiel ĝi estas ilia normala kutimo, sed inside silentante, kiu ŝajnis minace al mi. Estis komanĉoj, kion mi nun ekkonis per la koloroj de la ŝminkitaj vizaĝoj. Nur momenton poste ili haltis ekstere antaŭ la muro, kiu estis tiel alta, ke oni ne plu povis vidi la rajdantojn. Ili estis armitaj per lancoj, arkoj kaj sagoj. Nur la antaŭrajdanto, kiu verŝajne estis la estro, havis pafilon en la mano. Kelkaj el ili estis tirintaj longajn aĵojn malantaŭ iliaj ĉevaloj. Mi pensis, ke tiuj estis tendofostoj, sed baldaŭ devis konfesi, ke mi estis erarinta. Haste mi forlasis la malgrandan ĉambreteton pro sciigi la aliajn. Kiam mi atingis la koridoron, Old Death venis renkonte al mi el la alia ĉambro.

„Atentu!” li vokis. „La komanĉoj iras trans la muroj. Ili kunportas junajn arbojn kiel grimpiloj. Rapide sur la platformon!”

Sed tio ne eblis tiel rapide, kiel li deziris. La *peón*-oj troviĝis unu etaĝon sub ni, tie, kie la servistaro normale havis sian lokon. Por ili la vojo al la platformo estis eĉ pli longa ol por ni. Sed ankaŭ ni du estis malhelpataj rapide suprengrimpi, ĉar samtempe kiel la *caballero* ties du sinjorinoj elpaŝis en la koridoron, kaj ŝutis timiĝintajn demandojn sur nin. Certe pluraj minutoj pasis, antaŭ ke ni havis la ŝtuparon malantaŭ ni, en tia situacio ege valora tempo. La malbona konsekvenco de la tempoperdo ankaŭ tuj efikiĝis. Kiam ni atingis la platformon, la unua indiano jam svingiĝis trans la rando. Lin sekvis dua, tria, kvara. Ni havis niajn armilojn en la manoj, sed ne plu povis malebligi la eniron al ili, sen simple mortpafi ilin. Per la helpo de la menciitaj junaj arboj ili estis grimpintaj sur la eksteran muron, kaj tiam ankaŭ sur la tri platformojn per nekredebla rapideco. Ni staris nun sur la mezo de la plej alta etaĝo, dum ili ankoraŭ troviĝis sur ties rando.

„Direktigu la pafilojn al ili! Ne lasu ilin alveni!” Old Death ordonis. „Antaŭ ĉio ni gajnu tempon.”

Mi nombris kvindek du ruĝulojn, el kiuj neniu ĝis tiam estis elpuŝinta nur krieton. Ni estis surprizigintaj tutplene de ili. Sed ili tamen ne aŭdacis alveni tuj, sed restis je la rando de la platformo, kaj tenis iliajn arkojn kaj sagojn prete. Ili estis lasintaj la lancojn malsupre, pro ne esti ĝenataj de ili dum la grimrado. La *caballero* iris kelkajn paŝojn renkonte al ili, kaj demandis en tia miksaĵo el la hispana, angla kaj indiana, kiu estas uzata tie en la limejo pro interkomprenigo:

„Kion la ruĝaj viroj volas ĉe mi? Kial ili iras en mian domon, sen demandi pri mia permeso antaŭe?”

La estro, kiu nun estis ekpreninta sian pafilon per la mano, antaŭiris kelkajn paŝojn.
„La militistoj de la komanĉoj venis, ĉar la palvizaĝo estas ilia malamiko. La suno de la hodiaŭa tago estas la lasta, kiun la blanka viro vidos.“

„Mi ne estas malamiko de la komanĉoj. Mi amas ĉiujn ruĝajn virojn, sen demandi, al kiu tribo li apartenas.“

„La palvizaĝo eldiras grandan mensogon. En tiu domo estas kaŝita ĉefo de la apaĉoj. La apaĉaj hundoj estas la malamikoj de la komanĉoj. Ajn kiu akceptas apaĉon kiel gasto, estas nia malamiko kaj ekmortu.“

„*Caramba!* Ĉu vi do volas malpermesi al mi akcepti iun kiel mia gasto, kiam ĝi plaĉas al mi? Kiu ordonu tie ĉi, ĉu vi aŭ mi?“

„La militistoj de la komanĉoj grimpis sur tiun ĉi domon, do estas la ordonantoj tie ĉi. Eldonu la apaĉon al ni! Aŭ ĉu vi volas nei, ke li troviĝas ĉe vi?“

„Ne ekideos al mi nei tion. Nur kiu timas, eldiras mensogon. Sed mi ne sentas timon antaŭ la komanĉoj, kaj mi volas —“

„Ĉesu!“ Old Death interrompis lin mallaŭte. „Ne tiel mallantu, Don Atanasio!“

„Ĉu Vi opinias, ke mi neu?“ la meksikano demandis.

„Memkompreneble. Diru la veron estus pura memmortigo nun.“

„Ĉu memmortigo? Kion tiuj homoj volas fari kontraŭ niaj dek kvar pafiloj?“

„Multon, ĉar ili nun estas ĉi supre. La multenombro el ili ja ekmortos. Sed ankaŭ ni ricevus kelkajn sagojn kaj tranĉilajn klingojn en la korpon, Don Atanasio. Kaj eĉ se ni venkos, la travivontoj alvenigos la aliajn kvincent. Lasu min agi! Mi parolos al ili.“

Old Death turniĝis al la estro de la ruĝuloj.

„La vortoj de mia frato ekmirigas nin. Kiel la komanĉoj ekhavis la penson, ke tie ĉi troviĝus apaĉo?“

„Ili ĝin scias“, la demandito mallonge insistis.

„Do vi scias pli ol ni.“

„Ĉu vi volas diri, ke ni eraras? Tiukaze vi eldiras mensogon.“

„Kaj vi do diras vorton, kiun vi devus repagi al mi per via vivo, se vi ripetus ĝin. Mi ne lasas min nomi mensoganto. Vi vidas niajn pafilojn direktitaj al vi. Necesas nur unu mansigno de mi, ke ili ekpafos kaj mortigos vin kaj viajn anojn.“

„Kelkajn; sed la aliaj venigos iliajn fratojn al vi. Tie ekstere troviĝas multaj militistoj de la komanĉoj pli, pli ol dekoble dek kaj tio kvinoble. Ili viŝos tiun domon for de la tero.“

„Ili certe ne sukcesos grimpi trans la muro, ĉar ni nun estas avertitaj. Ni salutis ilin de ĉi supre per tiom kugloj, ke neniu el ili fine restus.“

„La blanka viro havas grandan kaj vastan buŝaĉon. Kial li parolas al mi? Ĉu li nu estas la posedanto de ĉi tiu domo? Kiu li estas, kaj kiel li nomiĝas, ke li aŭdacas paroli al la estro de la komanĉoj?“

Old Death faris forĵetantan manmovon.

„Kiu estas la estro de la komanĉoj? Ĉu li estas fama militisto, aŭ ĉu li sidas inter la maljunuloj de la konsilantaro? Li ne havas la plumon de la milita aglo en siaj haroj, kaj mi ankaŭ ne vidas iajn aliajn signojn de ĉefo je li. Sed mi estas ĉefo de la palvizaĝoj. De kiu tribo de la komanĉoj vi nu estas, ke vi unue demandu, kiu estas mi? Mia nomo

estas Koŝa-pehve, kaj mi fumis la pipon de la paco kun Ojo-koltsa, la ĉefo de la komanĉoj. Ankaŭ mi hieraŭ interparolis kun lia filo Avat-vila, kaj dormis dum la nokto ĉe liaj militantoj. Mi estas amiko de la komanĉoj, sed kiam ili nomas min mensoganto, mi ripetos al ili per kuglo.“

Tra la ruĝularo venis murmurado. Ilia estro mallaŭte parolis kun ili. La mienoj, per kiuj ili vidis al Old Death rimarkeblis, ke lia nomo estis farinta grandan impreson al ili. Post mallonga interkonsilado la estro returniĝis al la *scout*.

„La militistoj de la komanĉoj scias, ke Koŝa-pehve estas amiko de la Blanka Kastoro; sed liaj vortoj ne estas tiuj de amiko. Kial li sekretenas la ĉeeston de la apaĉo antaŭ ni?“

„Mi fortenas nenion antaŭ vi, sed asertas, ke li ne estas tie ĉi.“

„Sed tamen ni eksciis la malon, fakte de palvizaĝo, kiu iĝis en la savecon de la komanĉoj.“

„Kiu estas la nomo de tiu palvizaĝo?“

„La nomo ne estas farita por la buŝoj de la komanĉoj. Ĝi sonas kiel Ta-hi-ha-ho.“

„Ĉu Gavilano?“

„Jes, tiu ĝi estas.“

„Do la komanĉoj estas la viktimoj de granda eraro. Mi konas tiun viron. Li estas malbonulo, kaj havas la mensogon sur sia lango. La militistoj de la komanĉoj pentos, ke ili prenis lin sub ilian savon.“

„Mia frato eraras. La palvizaĝo diris la veron al ni. Ni scias, ke Winnetou alportis Inda-niŝon, kaj tiam povis fuĝi trans la Honobiŝ. Sed ni kuros malantaŭ li, kaj kaptos lin por la torturofosto. Ni scias, ke Inda-niŝo estas lezita je unu brako kaj unu kruro. Ni eĉ konas la lokon, kie li troviĝas.“

„Se tio veras, diru ĝin al mi!“

„Oni paŝu malsupren tri fojojn en la profundecon de la domo, ĝis tie, kie estas multaj pordoj dekstren kaj maldekstren de malvasta koridoro. Tie oni malfermu la lastan pordon je la maldekstra mano. Tie la apaĉo restas sur kuŝejo, kiun li ne povas forlasi per sia malforto.“

„La palvizaĝo mensogiĝis al vi“, la maljuna *scout* asertis trankvile, kvankam li estis ektimiĝinta dum la lastaj vortoj de la komanĉo. „Vi ne trovos apaĉon je la priskribita loko.“

„Do lasu nin paŝi malsupren, pro pruvi, kiu diris la veron, vi aŭ la palvizaĝo!“

„Tion mi kompreneble mi ne permesos. Tiu ĉi domo estas por la viroj, kiuj iras en ĝin kun la permeso de la posedanto, sed ne por tiuj, kiuj atakas ĝin malamikece.“

„Laŭ viaj vortoj ni kredu, ke la apaĉo jes troviĝas tie ĉi. La Blanka Kastoro ordonis al ni venigi Inda-niŝon, kaj ni agu laŭ lia ordono.“

„Vi refoje eraras. Mi ja malpermesas la efikigon de via deziro ne ĉar la apaĉo troviĝas tie ĉi, sed ĉar via deziro estas ofendo al mi. Kiam Old Death diras al vi, ke oni mensogiĝis al vi, vi ĝin kredu. Se vi tamen volas perforte ebligi la eniron, do provu ĝin! Ĉu vi do ne komprenas, ke unu el ni sufiĉas defendi la enirejon? Kiam li staras ĉi malsupre je la ŝtuparo, li povus mortpafi ĉiun el vi, kiu riskos paŝi tien malsupren.“

Vi ne sukcesos ion tie ĉi perforte, sed mi volas fari pacigan proponon al vi. Iru malsupren antaŭ la pordon kaj petu pri eniro, kiel ĝi decas, kaj eble ni akceptos vin kiel amikojn!“

„Koŝa-pehve faras konsilon al ni, kiu tre bonas al li, sed ne al ni. Se li havas puran konskiencon, li permesu al ni grimpi sur la domon. Se li ne faros tion, ni restados tie ĉi kaj sendos mesaĝiston pro venigi la tutan aron de la komanĉoj. Tiam Koŝa-pehve ja estos devigata lasu nin eniri.“

„Sed ne! Eĉ se venus mil komanĉoj, ĉiam nur unu povus supreniri samtempe, kaj devus pagi tion per sia vivo. Cetere vi ne sukcesos forsendi mesaĝiston, ĉar ĵus kiam li estos forlasinta la savecon de la muro, mi pafos lin teren per kuglo. Mi estas amiko de la komanĉoj. Sed vi venis kiel malamikoj, kaj estas traktataj kiel tiuj.“

Dum la tuta vortinterŝanĝo niaj pafiloj estis direktataj al la indianoj. Kvankam ili estis sukcesinta grimpi sur la platformon, ili tamen ankoraŭ estis en malavantaĝo kontraŭ ni. Tion ilia estro ja komprenis, kaj tial li rekomencis interkonsili mallaŭte kun siaj homoj. Sed ankaŭ nia situacio ne estis enviinda. Old Death pripense gratis la ejon malantaŭ sia maldekstra orelo.

„La afero malbonas. La saĝeco malpermesas al ni, ke ni traktas la komanĉojn malamike. Se ili venigos la aliajn, ni pereos. Nu, se ni povus kaŝi la apaĉon tiel, ke ĝi ne eblus trovi lin! Sed mi konas tiun ĉi domon ekzakte, kaj scias, ke ne estas kaŝejo en ĝi.“

„Do ni elportu lin!“ mi konsilis.

„Ĉu elportu?“ la maljunulo ridis. „Ĉu la diablo Vin regas, *Sir*? Nu en kia maniero?“

„Ĉu Vi forgesis la du sekretajn pordojn? Ili troviĝas je la malantaŭa flanko, kaj la komanĉoj staras antaŭe. Mi elportos Inda-niŝon eksteren en la arbedaĵon apud la rivero, ĝis ili forestos.“

„Tio penso ne malbonas“, Old Death opiniis. „Mi ne pensis pri tiuj pordoj en tiu ĉi momento. Eble li estus elportebla. Sed kio, se la komanĉoj estis surpostenigitaj gardistojn ekstere?“

„Tion mi ne kredas. Ili ne estas multe pli ol kvindek. Kelkaj ja restu ĉe la ĉevaloj antaŭ la muro. Tial ne ekspektendas, ke ili ankaŭ starigis virojn malantaŭe.“

„Bone, ni povas ĝin provi, *Sir*. Vi transprenu la taskon kun unu el la *peón*-oj. Ni agos tiel, ke ili ne vidos vin iri malsupren, kaj tiam ni kunstarigos tiel, ke ili ne povas nombri nin kaj ekkoni, ke du el ni mankas. La sinjorinoj helpu al Vi, kaj reŝovu la ŝranketon antaŭ la muron, kiam Vi elestos.“

„Kaj unu proponon plu!“ mi diris. „Ĉu ni ne povus irigi ĵus tiujn sinjorinojn en la ĉambregon de la malsanulo? Kiam la ruĝuloj vidos, ke tie loĝas virinoj, ili estos duoble konvinkitaj, ke neniuj indianoj estis troviĝinta tie.“

„Tute prave!“ la maljuna *caballero* komentis. Vi nur bezonas meti kelkajn kovrotukojn sur la teron kaj transporti la pendmatojn el la ĉambroj de mia edzino kaj mia nepino. Hokoj pro pendigi tiujn estas en ĉiuj ĉambroj. La sinjorinoj tuj kuŝiĝu en la pendmatojn. Sed Vi trovos la plej bonan kaŝejon por la apaĉo malsupre de la loko, kie Vi estis baninta. Tie pendas densaj, florhavantaj petuniaj volvkreskaĵoj ĝis en la akvo. Sub tiu ni estis kaŝintaj nian boaton. Kiam Vi metos la apaĉon sur ĝin, neniuj komanĉoj

povos trovi lin. Pedro iru kun Vi. Nur kiam Vi estos reveninta, ni permesos al la indianoj iri en la internon de la domo.“

Tiel mi paŝis nerimarkite kun la *peón*, kiu nomiĝis Pedro, en la domon, kie la du sinjorinoj afliktoplene atendis la okazaĵojn de la afero. Kiam ni sciigis ilin, kion ni planis, ili tuj estis pretaj helpi al ni dum nia agado. Kure ili alportis kovrotukojn kaj pendmatojn. La apaĉo estis volvita en unu de la tukojn. Kiam li aŭdis, ke la komanĉoj estis tie pro serĉi lin, li diris per malforta voĉo:

„Inda-niŝo estis vidinta multajn vintrojn, kaj lia tagaro finiĝas. Kial la bonaj palvizaĝoj lasu sin mortigi pro li? Ili donu lin al la komanĉoj, sed unue mortigu lin. Li petas pri tio.“

Mi mallonge neis, kaj rimarkis dum tio, ke la maljunulo ankaŭ ne rekonis min per mia voĉo. Li certege estis tre laca kaj malforta. Do ni portis lin rekte el la ĉambreto. La ŝranketo estis ŝovata flanken, kaj la vundita senĝenate portata ĝis antaŭ la domo tra la kaŝita pordo. Ĝis nun neniu estis rimarkinta nin. Ekstere estis arbedaĵaro, kiu kaŝis nin en tiu momento. Tiam rapide trans la korto, al la eta, arbedkovrata pordo en la muro. Ni trarampis, ree en la arbedaĵon. Sed nun estis iom da libera spaco inter nia kaŝejo kaj la proksima rivero, kiun ni transpasu. Mi gardiĝe elvidis kaj rimarkis je mia elrevigo komanĉon, kiu tie sidis sur la tero, kaj estis surteriginta lancon, sagingon kaj arkon antaŭ si. Li devis gardi la malantaŭa flanko de la muro, fakto, kiu ŝajne nebligis la efikigon de nia intenco.

„Ni iru reen, *señor*!“ Pedro diris en la hispana lingvo, kiam mi montris la ruĝulon al li. „Ni ja povus mortigi lin, sed tio direktigus la venĝon de la aliaj al ni.“

„Ne, ni mortigu lin neniukaze! Sed estu ebla forlogi lin.“

„Tion mi ne kredas. Li ne forlasos sian postenon, ĝis li estos forvokata.“

„Kaj tamen mi havas planon, kiu promesas sukceson. Vi restu kaŝata tie ĉi. Sed mi lasos min vidi antaŭ la *indsman*. Tuj kiam li vidos min, mi agos kvazaŭ mi ektimiĝus, kaj fuĝos. Li sekvos min.“

„Aŭ li sendos sagon en Vian korpon.“

„Pri tio mi certe pretiĝu.“

„Ne faru tion, *señor*!“ la *peón* avertis. „Estus tro granda risko. La komanĉoj pafas kun iliaj sagoj same bone kiel ni kun la pafiloj. Kiam Vi fuĝos, Vi turnos Vian dorson al li, kaj ne povos vidi la sagon, kaj ne povos flankeniĝi de ĝi.“

„Mi fuĝos tra la rivero. Kiam mi naĝos per la dorso malsupre, mi tenos la komanĉon en mia okulo, kaj subakviĝos tuj kiam li pafos. Li kredos, ke mi havas ian malican intencon kontraŭ liaj kunuloj, kaj verŝajne li sekvos min en la akvon. Sur la alia bordo mi akceptos lin kaj tuj sendanĝerigos lin per batego sur la kapon. Vi ne forlasu tiun lokon ne antaŭe, ĝis mi revenos. Antaŭe dum la banado mi vidis la petunian volvkreskaĵon kaj do scias, kie la boato estas. Mi alnaĝigos ĝin kaj albordigos ĵus ĉi vidalvide.“

Pedro klopodis rifuzigi min pri mia plano, sed mi ne povis akcepti liajn kontraŭdirojn, ĉar mi ne sciis, kiel alimaniere ni povis savigi la vivon de la apaĉo. Do mi tuj ekagis. Pro ne evidentigi la lokon, kie ni troviĝis, mi unue kaŝiris kelkan distancon sub la arbedo laŭ la muro, kaj tiam elpaŝis. Tio kaŭzis la ŝajnon, kvazaŭ mi estis irinta

ĉirkaŭ la angulo. La komanĉo ne tuj vidis min. Sed baldaŭ li turnis sian vizaĝon al mi, kaj subite ekstarigis. Mi duone deturnigis, proke li ne rekonu miajn vizaĝajn trajtojn poste. Li vokis al mi, ke mi irĉesu, kaj kiam mi ne obeis, li ekprenis la arkon de la tero kaj eligis sagon el la sagingo. Kelkaj rapidaj saltoj, kaj mi estis atinginta la arbedaĵon de la bordo, jam antaŭ ke li povis pafi. Tuj mi saltis en la akvon, turnigis sur la dorson, kaj naĝis al la alia bordo. Post malmultaj sekundoj la ruĝulo rompis sian vojon tra la arbedaĵo, vidis min kaj celis al mi. La sago iĝegis de la ŝnuro, kaj mi tuj subakvigis.

Mi ne estis trafita.

Kiam mi reelakvigis, mi vidis la komanĉon kun antaŭen klinita suprakorpo stari ekspektoplene sur la bordo. Li rimarkis, ke mi videble estis nevundita. Duan sagon li ne kunhavis, ĉar li estis lasinta la sagingon kuŝante sur la tero. Tial li forĵetis la arkon kaj saltis en la akvon. Tion mi estis intencinta. Pro logi lin, mi agis kvazaŭ mi estus malbona naĝanto, kaj lasis lin veni proksime al mi. Tiam mi denove subakvigis kaj provis antaŭeniĝi laŭeble rapide laŭfluen. Kiam mi reaperis, mi troviĝis proksime al la bordo. La komanĉo estis for kontraŭflue, kaj serĉis min. Nun mi havis la intencitan antaŭecon, naĝis al la bordo, iris sur ĝi kaj saltis pli for inter la arboj, en la kontraŭfluan direkton. Mi vidis tie grandan, muskokovritan kverkon, kiu taŭgis pro mia plano. Ĉirkaŭ kvin paŝojn for de ĝi mi pase kuris kelkan distancon plu, tiam faris duonan cirklon, kaj revenis al la arbo, pro kaŝiĝi malantaŭ ĝi. Premiĝinte proksime al la arbo mi atendis la alvenon de la ruĝulo, kiu ĉiukaze sekvis miajn klarvideblan spuron. Tiam li fakte alkuregis, malsekege per la akvo kiel mi, kaj laŭte anhelante, la vidon direktigata al mia spuro. Li paskuris, kaj mi malantaŭ li. Lia laŭta anhelado nebligis al li aŭdi miajn paŝojn, des pli multe, ĉar mi tuŝis la teron nur per la piedpintoj. Mi devis fari longajn saltojn pro atingi lin. Tiam plu nur ega salto krude al lia korpo, tiel ke li falegis per tuta forto malantaŭen sur la teron. Tuj mi genuiĝis sur lin kaj ekprenis lian kolon. Unu pugnobaton sur la tempion, kaj li ne plu moviĝis.

Neproksime de la loko, kie la venkito kuŝis, estis platano rompigitata al la rivero, kies akvo flupasis ĉirkaŭ unu metron malantaŭ ĝia sekigita pinto. Tio estis bonega ebleco al mi reiri en la riveron sen lasi spuron. Mi grimpis sur la trunkon kaj kuris sur ĝi, ĝis mi troviĝis super la akvo. Tiam mi ensaltis. Preskaŭ ĵus rekte antaŭe mi vidis la florojn de la petunioj brileti. Tien mi naĝis, malligis la boaton, suriĝis, kaj direktis la naĝilon al la bordloko, kie la apaĉo estu enboatigata. Tie mi ligis la boaton al radiko kaj deĝis. Ni devis hasti pro esti preta, kiam la apaĉo regajnus la konscion. Inda-niŝo estis portata al la boata, en kiu ni faris por li taŭgan kuŝejon per kovrotuko kaj liaj vestaĵoj. Pedro tuj reiris al la muro. Mi rerimenis la boaton sub la petunioj, fiksligis ĝin tie, naĝis reen kaj demetis en la densa volvokreskaĵoj la tolan vestaĵon, pro sektordi ĝin. Kiam mi estis resurmetinta ĝin, mi ekzamenis la alian bordon per la okulo, pro ekscii, ĉu la komanĉo jam estis revekinta, kaj ĉu nia agado estis rigardinta, sed mi vidis lin tute ne. Ni rampis tra la kaŝa pordeto reen en la *estancia*:n. Dum mia petolaĵo pasiĝis apenaŭ kvarona horo. De la *señora* mi ricevis sekan tolvestaĵon, kaj nun mi povis ridi en la vizaĝon de ĉiu komanĉo, kiu volis aserti, ke mi estus estinta ekster la domo, kaj eĉ en la rivero.

Nun la sinjorinoj kuŝiĝis sur iliajn pendmatojn, sed mi kaj Pedro iris supren al la platformo, post ni estis reprezentaj niajn armilojn. Diskrete ni miksiĝis reen inter la

aliajn. La du partioj ankoraŭ estis intertraktantaj. Old Death estis restinta je sia aserto, ke la traserĉo de la domo estus ofendo al li kaj la *estanciero*. Kiam mi mansignis al li, ke la apaĉo estis en saveco, li ĉiam pli cedis kaj fine deklaris, ke estis permesata al kvin komanĉoj certiĝi, ke la apaĉo ne troviĝas tie ĉi.

„Kial nur kvin?“ la estro demandis. „Ĉu ne unu el ni estas kiel la alia? Kion faras unu, tion rajtas fari ĉiuj. Old Death povas fidi al ni. Ni ne tuŝos ion en la domo. Neniu el ni damaĝos aŭ eĉ forprenis ion.“

„Bone! Vi vidu, ke ni estas grandanimecaj. Vi ĉiuj rajtu iri en la domon, proke ĉiu povas konvinkiĝi, ke mi diris la veron. Sed mi postulas, ke vi demetas ĉiujn viajn armilojn, kaj ke ni rajtas ajn ĉiun, kiu tuŝas personon aŭ aĵon sen nia permeso, teni lin tie ĉi pro puni lin.“

Dum la ruĝuloj interkonsilis pri tiu postulo, Old Death petis min rakonti al li, kiel mi estis forportinta la maljunan ĉefon. Mi faris tion tiel mallonge kaj ankaŭ tiel detale kiel eble. Dum mi raportis, la maljunulo direktigis siajn okulojn grandiĝite, kaj per longa pripensa vido al mi, sed ne interrompis min. Post mi estis finiĝinta, li diris:

„M’jam antaŭe en La Grange, kaj ankaŭ poste elparolis mian aprecon, kaj hodiaŭ mi duobligu ĝin. Vi estas ankoraŭ tre juna, sed mi taksas, ke Vi havas multe pli en rezervo, ol Vi montras.“

Per tio li turniĝis de mi kaj al la ruĝuloj, kiuj estis decidiĝintaj intertempe akcepti la postulon de la *scout*. Ili demetis iliajn arkojn, sagingojn kaj tranĉilojn, kaj supre envenis unu post la alia. Jam antaŭ ke mi estis foririnta kun Pedro, la *vaquero*:j estis stariĝintaj ekstere sur la ebenaĵon kun bonaj armiloj kaj ĉevaloj, la vidojn direktataj al ni. Ili estis atendintaj signon de ilia estro, kaj konduktinte trankvile nur tial, ĉar tiu signo ne estis donita.

El ni la *estanciero* kaj Old Death estis difinitaj malfermi ĉiujn ĉambrojn al la komanĉoj. Tri restis sur la platformo, kaj la aliaj disiĝis sur la koridoroj, pro povi tuj ekagi kontraŭ ĉia atako de la ruĝuloj per la armiloj. Mi staris en la plej malsupra koridoro, kaj staris flanke de la pordo de la ĉambreto, en kiu la apaĉo estis kuŝinta. La komanĉoj rekte venis malsupren al tiu pordo. Old Death malfermis ĝin. Estis videbla je la indianoj, ke ili estis konvinkitaj trovi la Bonan Viron tie. Sed anstataŭe ili vidis la du sinjorinojn, kiuj kuŝis en iliaj pendmatoj kaj legis.

„Uŝ!“ la estro vokis elrevigite. „Tio estas *squaw*:oj!“

„Jes“, Old Death ridis. „Kaj tie devus kuŝi la ĉefo de la apaĉoj, kiel la palvizago mensogis. Do eniru kaj serĉu lin!“

La vido de la estro mallonge vagis tra la ĉambreto; tiam li rifuzis.

„Militisto ne iras en la *wigwam*:on de virinoj. Tie ĉi estas neniu apaĉo. Mia okulo ekvidus lin.“

„Do serĉu en la aliaj ĉambroj!“

Ĝi daŭris pli ol horo, ĝis la indianoj finigis ilian traserĉadon. Kiam ili ne trovis spuron de la apaĉo, ili refoje iris en la ĉambreton, kiu estis indikita al ili. La sinjorinoj devis forlasi la ĉambreton, kiu nun malgraŭ ĉio estis ekzamenanta detale. La ruĝuloj eĉ levis la kovrotukojn kaj la matracojn, kiuj kuŝis sur la tero. Ankaŭ la teron mem ili

ekzamenis, ĉu eble tie estis kaŝita truo sub ĝi. Finfine ili estis konvinkitaj, ke la serĉato ne troviĝis en la *estancia*. Kiam la estro konfesis tion, Old Death diris:

„Mi diris tion al vi, sed vi ne kredis min. Vi havis pli da fidon pri mensogisto ol pri mi, kiu estas amiko de la komanĉoj. Kiam mi venos al la Blanka Kastoro, mi plendos al li.“

„Ĉu mia blanka frato volas iri al li? Do li povas rajdi kun ni.“

„Tio ne eblas. Mia ĉevalo estas elĉerpita, mi povas pluiri nur morgaŭ. Sed la militistoj de la komanĉoj forlasos ĉi regionon jam hodiaŭ.“

„Ne, ni ankaŭ restos tie ĉi. La suno malleviĝis pro ripozi, kaj ni ne rajdas dum la nokto. Je la komenco de la tago ni ekrajdos, kaj tiam mia frato povas iri kun ni.“

„Bone! Sed mi ne akompanos vin sole. Estas kvin kunuloj ĉe mi.“

„Ankaŭ ili estas bonvenigitaj de la Blanka Kastoro. Miaj blankaj fratoj permesu al ni resti dum la nokto en la proksimo de la domo.“

„Al tio mi ne kontraŭas“, la *estanciero* deklaris. „Mi jam diris al vi, ke mi estas amiko de ĉiuj ruĝaj viroj, se ili venas paceme al mi. Pro pruvi tion al vi, mi donacos al vi junan bovon, kiu estu buĉata. Vi bruligu fajron pro rosti la viandon.“

Tiu promeso faris bonan impreson al la komanĉoj. Ili nun estis fakte konvinkitaj, ke ili agis maljuste kontraŭ ni, kaj montris ilian plej amikecan flankon al ni. Certe ankaŭ helpis al tio la digno, kiun Old Death havis inter ili. Ili vere ne estis tuŝintaj ion, kaj nun forlasis la domon, sen ke tio estis postulita de ni. La ŝtuparoj estis malsuprenigitaj, kaj la pordego estis malferma. Kelkaj armitaj *peón*-oj restis sur la platformo kiel gardistoj. Malgraŭ la ŝanĝita konduko de la ruĝuloj oni ne devis neglekti atenton. Ni aliaj kuniris malsupren, kaj nun ankaŭ la *vaquero*-oj aliris kaj ricevis la ordonon ekkapti junbovon. Ĉiuj ĉevaloj de la komanĉoj staris je la antaŭa flanko de la ĉirkaŭa muro. Tri gadistoj estis ĉe ili. Ankaŭ je la aliaj flankoj estis surpostenigitaj gardistoj. Tiuj viroj nun estis alvenigataj. Unu el ili estis la arkpafisto, kiun mi logis tra la rivero. Lia tre nesufiĉa vestaĵo ankoraŭ estis malseka. Li estis reenirinta al sia posteno, kaj ankoraŭ ne estis havinta la ŝancon anonci la strangan okazaĵon al la estro. Nun li paŝis al li kaj rakontis sian spertaĵon, sed tiel, ke ni blankuloj ne povis aŭdi ĝin. Li ŝajne estis finiĝinta sian raporton, kiam lia okulo ekvidis al mi. Pro la ŝminkaĵo sur lia vizaĝo mi ne povis rimarki ŝanĝiĝon de lia mieno, sed li faris moviĝon de kolero, montris al mi kaj vokis kelkajn vortojn al la estro, kiujn mi ne komprenis. La estro vidis al mi per minace ekzamenanta vidon, kaj tiam paŝis al mi.

„La palvizaĝo estis ĵus naĝinta trans la rivero. Vi terenbatis ĉi tiun militiston, ĉu?“

Old Death tuje interiĝis, alvenante kaj demandante la estron, al kio la ruĝulo celis per siaj vortoj. La demandito rakontis, kion li eksciis. Sed la maljunulo gaje ekridis.

„La ruĝaj militistoj ŝajne ne kapablas diferencigi unu blankulon de alia. Ĉiel estas demandenda, ĉu vere estis palvizaĝo, kiun tiu ĉi militistoj de la komanĉoj renkontis.“

„Estis blankulo“, la rilatito certece asertis. „Kaj neniŭ alia, sed tiu ĉi! Mi vidis lian vizaĝon, kiam li naĝis kun la dorso malsupre. Ankaŭ li surhavis blankan vestaĵon kiel tiu.“

„Nu! Ĉu li naĝis en tiuj ĉi vestaĵoj tra la rivero, ĉu? Via vestaĵo ankoraŭ malsekas. Lia ankaŭ ankoraŭ estu malseka. Sed tuŝu lin, kaj vi konvinkiĝos, ke li estas tute seka!“

„Tiukaze li estas demetinta la malsekan kaj surmetinta sekan en la domo.“

„Kiel li povis iri en la domon? Ĉu viaj gardistoj ne staris tie ĉi ĉe la pordego? Neniu homo povas iri en la domon aŭ eliri de interne, sen uzi la ŝtuparojn, ĉe kiuj staris ĉiuj militistoj de la komanĉoj. Do ĉu mia kunulo povis esti ekster la domo?“

Ili kontentiĝis, kaj la trompita postenulo fine mem havis la opinion, ke li eraris. Kiam tiam la *estanciero* menciis, ke ekde kelka tempo ĉirkaŭmigris figuro de ĉeval-ŝtelistoj en la regiono, al kiu la nekonato certe apartenis, la afero estis finigita. Nur la fakto restis enigmoplena, ke neniu spuro rimarkeblis, per kiu oni povis vidi, en kiun direkton tiu viro estis forkurinta. Pro klarigi tiun enigmon, la estro rajdis kun la postenulo kaj kelkaj aliaj trans la malprofundejo, kaj tiam al la loko, kie mi terenbatis la persekutinton. Sed feliĉe ĝi jam komencis malheliĝi, tiel ke pli detala ekzamenado de tiu loko ne plu povis okazi. Old Death, la ruzulo, kunprenis min pro promenadi laŭ la rivero. La okulojn direktite al la rajdantoj sur la alia bordo, kaj nur ŝajne okupiĝinte pri ili, ni malrapide pluiris kaj kvazaŭ neintencite restis starante ĉe la petunioj. Tie la maljunulo diris tiel mallaŭte, ke nur mi kaj la apaĉo en la boato povis aŭdi lin:

„Jen staras Old Death kun la juna palvizaĝo, kiu kaŝis la Bonan Viron tie ĉi. Ĉu la ĉefo de la apaĉoj eble rekonas min per mia voĉo?“

„Jes“, estis la same mallaŭta respondo.

„La komanĉoj nun kredas, ke la Bona Viro ne troviĝas tie ĉi. Ili forrajdos je la mateno. Ĉu mia frato eltenos ĝin tiel longe en la boato?“

„La apaĉo eltenos ĝin, ĉar laodoro de la akvo freŝigas lin, kaj la febro ne revenos. Sed la Bona Viro ŝate volas scii, kiel longe Old Death kaj siaj kunuloj restos tie ĉi.“

„Ni forrajdos morgaŭ kun la komanĉoj.“

„Uŝ! Kial mia amiko aparteniĝas al niaj malamikoj?“

„Ĉar ni serĉas homojn, kiuj troveblas ĉe ili.“

„Ĉu la blankaj viroj ankaŭ renkontos la militistojn de la apaĉoj?“

„Tio facile eblas.“

„Do mi ŝate volas doni al la juna palvizaĝo, kiu riskis sian vivon pro kaŝi min, *totem:on*, kiun li povas montri al la militistoj de la apaĉoj, pro esti ĉiam bonvenigata de ili. Old Death estas ruza kaj sperta ĉasisto. La hundoj de la komanĉoj ne rimarkos lin, kiam li portos al mi, kiam ĝi malhelas, pecon da blanka ledo kaj tranĉilon. Antaŭ la tagokomenco li tiam povos deporti la *totem:on*, kiun mi faros dum la nokto.“

„Mi alportos ĉion, la ledon kaj la tranĉilon. Ĉu la Bona Viro deziras ion krome?“

„Ne. Inda-niŝo kontentas. La bona Manitou ĉiam gardu la vojojn de Old Death kaj la juna palvizaĝo!“

Ni iris reen. Neniu estis rimarkinta, ke ni estis starintaj unu minuton ĉe la rivero. La maljunulo klarigis al mi:

"Estas ega maloftaĵo, ke blankulo ricevas la *totem:on* de indiana ĉefo. Vi havas grandan feliĉon, *Sir*. La signo de la Bona Viro povos esti treege utila al Vi.“

„Kaj Vi volas riski havigi lin ledajon kaj tranĉilon, ĉu? Se Vi estos kaptata, Vi kaj la apaĉo pereos.“

„Sensencaĵo! Ĉu Vi pensas, ke mi estas enlerneja knabo? Mi scias ekzakte, kion mi

povas riski, kaj kion ne.“

Mi ja malgraŭ ĉio ne povis diri al li, ke la totemo de la Bona Viro havis malmultan valoron al mi, ĉar mi bezonis nur diri mian nomon al apaĉo, pro ekesti certa pri lia gardado. Per tio mi ja estus malkaŝiĝinta min. Ĉiel ĝi estis ŝajninta al mi antaŭe dum la rakontado de mia aventuro sur la rivero, kvazaŭ ekbrilis ekrimarko aŭ dubo en la okuloj de la *scout*.

Baldaŭ post ni estis reatinginta la *estancia*:n, la estro de la komanĉo revenis nenionsukcesinte. La spuro ne plu estis sufiĉe klare videbla.

La resto de la tago nun pasiĝis sen ĝeno, kaj same la nokto. Mi estis vekata de Old Death frue. Li donis al mi kvarangulan pecon de blanke tanita ledo. Mi rigardis ĝin. Nescianto povis rimarki nenion specialan en ĝi, escepte de kelkaj fajnaj enranĉaĵoj sur la glata flanko de la ledaĵo, kies signifon mi ja konis sufiĉe bone.

„Ĉu tio ĉi estas la totemo?“ mi kvankam demandis la maljunulon, dum mi turnis la ledpecon kvazaŭ nenionsciante jen kaj reen inter la fingroj. „Mi ne povas rimarki ion specialan en ĝi.“

„Ja ne necesas. Sed montru ĝin al la unua apaĉo, kiun Vi renkontos, kaj li klarigos al Vi, kian trezoron Vi posedas! La skribo de la totemo nun ankoraŭ estas nevidebla, ĉar la Bona Viro ne kunhavis farbon. Sed kiam Vi donos ĝin al apaĉo, li kolorigos la enranĉaĵojn, post kio la enranĉitaj figuroj estos videbligataj. Sed pro Dio ne lasu tiun ledpecon videbliĝi al komanĉo! Tiukaze li traktus Vin kiel malamikon! Kaj nun ŝanĝu Viajn vestaĵojn, kaj kunvenu eksteren! La komanĉoj certe estas pretaj pro ekrajdi post mallonga tempo.“

La ruĝuloj fakte estis okupiĝantaj pri iliaj matenmanĝo, kiu konsistis el la restaĵoj de la hieraŭaj viandaĵoj. Tiam ili kunigis iliajn ĉevalojn pro lasi ilin trinki je la rivero. Tio feliĉe okazis supre de la loko, kie la apaĉo estis kaŝinta kuŝante. Nun ankaŭ la *estanciero* kun siaj sinjorinoj aperis, kiuj ne plu montris ian timemon antaŭ la ruĝuloj. Kiam li rimarkis niajn ĉevalojn, kiuj estis alvenigataj de la *vaquero*:j, li diris kapskuante al Old Death:

„Tiuj ne estas ĉevaloj por Vi, *señor*. Vi scias, kian valoron havas bona ĉevalo. Vi estas delonga amiko de mi, kaj tial Vi kaj Viaj kunuloj havu pli bonajn ĉevalojn, ĉar la rajdado, kiu estas antaŭ Vi, estos longa kaj peniga.“

Ni danke akceptis la oferton de Don Atanasio. Per lia ordono la *vaquero*:j kaptis kvin duonsavaĝajn ĉevalojn por ni. Tiam ni adiaŭiĝis de li kaj de liaj sinjorinoj, kaj ekrajdis kun la komanĉoj.

Inda-niŝo, kiun ni devis lasi tie kiel ege lezita viro, estis, kiel mi aŭdis poste, deportita de postvenantaj apaĉoj, kaj bonfarte atingis la tendvilaĝojn de sia hejmejo. Tiurilate mia klopodo sukcesis. Sed mallongan tempon poste, Manitou kvankam forvokis lin. —

La suno ankoraŭ ne estis leviĝinta super la horizonton, kiam ni iris tra la Elm Creek kaj tiam galopis al la oriento, antaŭe ni kvin kun la estro de la komanĉoj, malantaŭ ni ties anoj sur iliaj malgrandaj, taŭzharaj, maldikegaj kaj tamen tiel persistemaj ĉevaloj. Ankoraŭ ne estis priparolata, kie kaj kiam ni estus renkontontaj la ĉefan aron de la komanĉoj. Nun ni eksciis, ke tiu ja ne estis haltinta, pro atendi la revenon de la deirinta

grupo, sed ke la estro de la grupo ricevis la ordonon kapti la Bonan Viron sur la *estancia*, kaj sendi lin sub la gardo de dek viroj en la vilaĝojn de la komanĉoj. La aliaj kvardek tiam venu haste al la Rio Grande kaj tie sekvi la spuron de la ĉefgrupo pro atingi ĝin. Ĉar la Blanka Kastoro estis eksciinta de Gibson, ke Winnetou estis foriĝinta tra la rivero, kaj tuj kunvenigus la apaĉojn, la komanĉo pensis, ke li hastu pro povi surprizgii la malamikojn, antaŭ ili povus pretiĝi pro defendiĝo. Al ni gravis antaŭ ĉio trovi Gibson:on ankoraŭ ĉe la komanĉoj.

Post ĉirkaŭ horo ni atingis la lokon, kie niaj indianaj kunrajdantoj hieraŭ estis deiĝintaj de la ĉefa grupo. En la sudo antaŭ ni estis ĉe la Rio Grande la Eagle-transpasejo kaj Fort Duncan, kiun la ruĝuloj devis eviti. Post kroma horo videblis malriĉaj herbaroj, kaj la dezerto Nueces estis malantaŭ ni. La spuro, kiun ni sekvis, estis rekta linio, kiu estis kruĉita de neniuj aliaj; la komanĉoj do estis nerimarkitaj. La tero ornamigis pli kaj pli per maldensaj kreskaĵoj, kaj finfine ni vidis arbaron aperi en la oriento. Tio anoncis la proksimon de la Rio Grande del Norte.

„Uj!“ la estro diris zorgliberigite elspirante. „Ni renkontis neniun palvizaĝon, kaj neniuj ĝenus nin tuj iri trans la rivero. La apaĉaj hundoj baldaŭ vidos nin proskimiĝi al ili, kaj ili ekhurlos je la ekvido al niaj bravaj militistoj.“

Kelkan tempon ni rajdis sub platanoj, ulmoj, *blackberry*:ujoj kaj gumarboj, tiam ni atingis la riveron. La Blanka Kastoro estis bona estro de siaj anoj. La spuro, kiu estis nia gvidilo, direktiĝis rekte al la loko, kie estis malprofundaĵo. La Rio Grande tie ĉi estis tre larĝa, sed ĝi enhavis malmulte da akvo. Nudaj sablaĵoj iĝis el ĝi. Ili konsistis el malfirma flusablo, sur kiuj estis danĝeraj lokoj, kie oni povis facile ensinki. Ĉi tie sur la bordo la komanĉoj estis restintaj dum la nokto, kion oni povis konkludi per la spuroj. Ni devis supozi, ke ili estis ekrajdinta same frue kiel ni. Sed ili ja ne povis antaŭeniĝi tiel rapide kiel ni, ĉar ili nun troviĝis en la regiono de la apaĉoj, kaj tial devis esti tre gardiĝe, per kio ilia rapideco estis treege malaltigata. Tiel oni vidis, ke ilia iro trans la rivero estis farita nur tre gardiĝe. Multnombraj piedpremsignoj pruvis, ke kelkaj rajdintoj estis deĉevaliĝintaj, pro ekzameni la trompajn sablaĵojn. La surireblaj lokoj estis markitaj per en la teron metitaj branĉoj. Estis multe pli facila al ni transiri, ĉar al ni necesis nur sekvi iliajn spurojn. La rivero estis disigita per la sablaĵoj en pluraj branĉoj, tra kiuj niaj ĉevaloj devis naĝi. Sur la alia flanko ni denove iru tra mallarĝa arba kaj arbeda zono, malantaŭ kiu estis herbejo, kaj fine sabla tero denove. Ni troviĝis en la regiono, kiu estas inter la Rio Grande kaj la Bolsón de Mapimi, kiu taŭgas bonege al loĝejo de sovaĝaj indiangoj, vasta sabla ebenaĵo, kiu estas interrompata nur per malgrandajn kaktarojn. Trans tiu ebenaĵo la klare videbla spuro kondukis al preskaŭ orienta, nur iomete suden deiganta direkto. Sed kiam mi estis havinta la opinion, ke ni atingus la komanĉojn hodiaŭ, mi estis erarinta. La per la ĉevalhufoj fore malantaŭĵetita sablo pruvis al ni, ke ili estis ege hastintaj. Tiel ĝi pluigiĝis, ĉiam plu. Fine ni transpasis mallarĝan, malaltan kaj senkreskaĵan montetaron, al kiu apudis denove sabla ebenaĵo.

Mi devis admiri la persistemon de la indianaj ĉevaloj. Ni estis rajdintaj ĉirkaŭ kvardek mejlojn, kaj tamen neniuj nuanco de elĉerpiĝo estis rimarkebla. Ankaŭ niaj bestoj, kiujn ni estis ricevintaj de Don Atanasio pruvis, ke la ŝanĝo en la *estancia* estis avantaĝa.

Estis mallonge post tagmezo, kiam ni rimarkis je nia ekmiro, ke la spuro subite ŝanĝis la direkton. Ĝi ekturiniĝis sudokzidenten. Kial? Certe estis kaŭzo pro tio. Old Death klarigis la fenomenon al ni, dum kiu mi agis, kvazaŭ mi ne ankaŭ estus rimarkinta, kion li ekrimarkis. Oni povis vidi per la hufpremsignoj, ke la komanĉoj estis haltintaj tie ĉi. Ĵus de nordo la spuro de du rajdintoj iĝis al tiu de la ruĝuloj. La maljunulo deĉevaliĝis, ekzamenis la premsignojn kaj tiam konkludis:

„Tie ĉi du indianoj venis al la komanĉoj. Ili estis donintaj mesaĝon al ili, kiu iĝis la militistojn de la Blanka Kastoro ŝanĝi la direkton. Ni ne povas fari ion alian, sed sekvi ilin.“

La estro de niaj ruĝaj akompanantoj same deĉevaligis, kaj certigis la aserton de la *scout*, post ankaŭ li estis ekzameninta la spurojn. Ni turniĝis sudorienten, kaj plurajdis en tiun direkton ĝis la vespero, dum kio ni sed malrapidigu nian rajdadon pro konsidero pri la ĉevaloj. Eĉ kiam ĝi krepuskis, la hufspuroj, kiujn ni sekvis, ankoraŭ estis klare diferencigeblaj de la glata sablareo. Sed tiam ĉio estis nigra en nigro. Ni volis halti. Sed tiam mia ĉevalo ekenspiregis tra la nazo, laŭte blekis kaj strebis plu. Versajne ĝi flaris akvon, kaj tial mi lasis ĝin iri laŭvole. Post kelkaj minutoj ni fakte venis al rivero, kie ni haltis.

Post tia streĉiga kaj varmega rajdado kiel la hodiaŭa, la akvo estis vera freŝigo al la homoj kaj la bestoj. Post mallonga tempo estis elektita restejo. La ruĝuloj surpostenigis gardistojn kaj lasis la ĉevalojn paŝtiĝi sub ilia gardo. Ni blankuloj sidiĝis kune. Old Death okupiĝis pri taksadoj, kiu akvejo tiu estis, kiun ni atingis tiel neekspektite, kaj fine haviĝis la opinion, ke ĝi estus la Morelos, kiu fluas en la Rio Granda: n ĉe la Eagle-transpasejo. Je la sekvinta mateno klariĝis, kie ni troviĝis ĉe granda akvofluo, tra kiu la komanĉoj estis naĝintaj ne malproksime de nia restejo. Ni denove eksekvis iliajn spurojn. Je la tagmezo la premsignoj direktiĝis plie al okcidento, kaj en tiu direkto ni ekvidis aperi senkreskaĵajn montojn. Old Death faris pripensan mienon.

„La afero ne plaĉas al mi“, li grumblis. „Mi ne povas kompreni la Blankan Kastoron, ke li riskas iri en tiun regionon. Ĉu Vi scias, kia areo estas tie antaŭ ni?“

„Jes, la Bolsón de Mapimi“, mi respondis, ĉar la demando estis direktita laŭŝajne al mi.

„Kaj ĉu Vi konas tiun dezerton?“

„Nur per mapoj.“

„La Mapimi estas vera farunvermujo, el kiu je ĉiuj tempoj eliris la sovaĝaj triboj, pro ĵetiĝi rabante sur la najbarajn landojn. Sed Vi ne pensu per tio, ke ĝi estas fruktodona lando, ke ĝi bredas tiom da homojn. Oni ja ĉiam rimarkas, ke ĵus la dezertaj regionoj estas la deirpunkto de popolmigradoj. La triboj, kiuj loĝas tie sur la altaĵoj kaj en la valoj, kanjonoj kaj profundaĵoj, estas ne facile venkeblaj. Mi scias ekzakte, ke pluraj grupoj de apaĉoj loĝas tie. Se ĝi estas la intenco de la komanĉo ataki ilin, mi tre bedaŭras ilin, ne la apaĉojn, sed la komanĉojn. En la nordo la apaĉoj patrolas inter la Rio Grande del Norte kaj la Rio Pecos, kaj ili regas la tutan nordokzidenton ĝis trans la Gila. La komanĉoj do riskas iri en embuskon, kiu facile povos esti ilia tombo.“

„Ho ve! Kaj ni kuniras en ĝin!“

„Jes, sed mi ne troe timas. Ni ne faris ian damaĝon al la apaĉoj, kaj tial mi esperas, ke ili ne traktos nin malamike. En la kazo de danĝero Via totemo havos bonan efikon.“

„Ĉu ne estas nia devo averti la komanĉojn?“

„Nu ĝin provu, *Sir!* Diru al dek fojojn da stultuloj, ke li stultas, kaj ili tamen certe ne kredos ĝin. Mi ĵus diris al la estro, kion mi pensas. Li krude blekis al mi, kaj diris, ke li sekvu la spuron de la Blanka Kastoro. Se ni ne volus kuniri, ni estus libere iri kien ni deziras.“

„Tio malĝentilis!“

„Jes, la komanĉoj ne partoprenis en lekcioj pri bona konduto kaj parolmaniero. Mirus min, se ne iu danĝeraĵo pretiĝas tie supre. Ni iris trans la limo; sed kiel ni sukcesos iri reen trans ĝi, tio estas skribita en libro, kiun mi ne jam legis.“